

Manfred Hausmann,  
La perloj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, kvankam scias vi, ke ja ligita  
kun man' kaj kor' al edzo estas mi,<sup>2</sup>  
de vi al mi sekrete alsendita  
jen estas tiu perl-par' ĉi.

Freneza devas esti vi - mi devas  
konfesi, ke feliĉon sentas mi  
la perlojn rigardante - Ĉu mi revas? -  
Ĉu vera estas tio ĉi?

Kaj nia dom' en sia olda brilo  
sin levas ĉe la reĝa ĝardenar'.  
Jen mia edz' kun sia batalilo,  
la estro de l' reĝ-gardistar'.

Kaj kion ankaŭ pensis menso via,  
dum vi al mi ofertis tion ĉi,  
Mi ja promesis, ke ĝis morto mia  
fidela volas resti mi.

Reprenu la donacon senespere!  
Se iam estus renkontintaj ni,  
- sed tion povis ne okazi vere -  
ja estus eble via mi.

*Traduko de la Germana poemo "Die Perlen" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 - †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-888-1770 (2013-06-04 23:53:48)*

*Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon  
<http://history.cultural-china.com/en/59History8512.html>.*

Manfred Hausmann,  
Die Perlen

Obwohl Ihr wisst, dass ich an einen Gatten  
gebunden bin, o Herr, mit Herz und Hand,  
habt Ihr mir diese beiden silbermatten,  
die Perlen heimlich zugesandt.

Ihr müsst von Sinnen sein, - Ich will gestehen,  
dass ich den Anhauch eines Glücks gefühlt,  
als ich die Perlen, gleichsam aus Versehen,  
an meine rosa Seide hielt.

Doch unser Haus, in seinem alten Glanze  
hebt bei des Kaisers Gärten sich empor.  
Mein Gatte steht im Funkeln seiner Lanze  
den kaiserlichen Wachen vor.

Was Euer Sinn, der kühne und erprobte,  
sich auch gedacht bei diesem Angebot,  
ich will dem Gatten, wie ich es gelobte,  
getreu sein bis an meinen Tod.

Nehmt das Geschenk zurück! Lasst ab zu hoffen! -  
Wie doch das Perlenpaar den Tränen gleicht!  
Vielleicht, wenn wir uns ehedem getroffen,  
wär ich die Eure jetzt. - Vielleicht.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 - †1986-08-06).*

*Arg-888-1769 (2014-04-07 17:45:33)*

*La poemo aperis en la libro "Hinter dem Perlenvorhang", Gedichte nach dem Chinesischen von Manfred Hausmann, Verlag S. Fischer, 1954. Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred\\_Hausmann](http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann). La poemo estas verkita laŭ poemo origine verkita de la china poeto Zhang Ji. Pri tiu vidu la viki-pediejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang\\_Ji\\_%28poet\\_from\\_Hubei%29](http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Ji_%28poet_from_Hubei%29).*

---

<sup>2</sup>aŭ: al edzo, ho sinjoro, estas mi,